

2 LA PROBLEMOJ DE LA REALO, DUA PARTO

2.1 Enkonduko

¹En "La problemoj de la realo, unua parto" estas traktitaj la tri aspektoj de la ekzistado. En tiu parto estas donitaj, interalie, kelkaj esencaj faktoj pri la materia strukturo de la kosmo, la kosma totala konscio, la dinamika energio de la pramaterio kaj la kosma organizaĵo.

²En ĉi tiu parto estos donitaj ankoraŭ kelkaj faktoj por vastigi la perspektivojn sur tiuj tri aspektojn de la ekzistado. Certaj ripetoj el la unua parto estas konsideritaj konvenaj por ke la prezento estu ankoraŭ pli klara.

³Per ĉi tiuj du partoj estas farita la peno prezenti la fundamentajn faktojn konsideritajn necesaj por doni al la homaro tiujn bezonatajn perspektivojn sur la ekzistadon, sen kiuj malorientiĝado estas neevitebla.

⁴Estas metita fundamento de la mondrigardo de la estonteco, unuafoje ekzakta laŭ konceptoj (kia ĝi devas esti por mensuloj), senigita je la neklareco de la simbolismo.

2.2 LA MATERIASPEKTO DE LA EKZISTADO

¹Nia kosmo, unu el sennombraj globoj en la pramaterio, konsistas el praatomoj. Tiuj estas formitaj en 48 ĉiam pli kunmetitajn specojn de atomoj tiel, ke ĉiu pli malalta speco enhavas ĉiam pli da praatomoj. Tiuj 49 malsamaj atomspecoj konsistigas 49 kosmajn mondojn de ĉiam pli grandaj gradoj de denseco. Pro tia kunmetiĝo de la materio ĉiuj pli altaj mondoj povas penetri ĉiujn pli malaltajn. Ĉiuj 49 atomaj mondoj okupas la saman spacon en la kosmo kaj elplenigas la kosman globon.

²La 49 atomaj mondoj estas dividitaj en sep seriojn po sep mondoj en ĉiu serio. La sepdividiĝo dependas de tio, ke la tri aspektoj de la ekzistado estas kombineblaj en la jenaj sep manieroj.

³La tabelo faciligas la analizon pri la kunmetiĝo de la materio, la rilatadoj de la aspektoj, la sep tipoj kaj departementoj:

1	1	2	3
2	1	2	3
3	1	2	3
4	1	2	3
5	1	2	3
6	1	2	3
7	1	2	3

1 = la volaspekto (movadaspekto)

2 = la konsciaspekto

3 = la materiaspekto

⁴La kosmaj mondoj elkonstruiĝas ”de supre”. Estante deorigine de eta etendiĝo, la kosmo kreskas senĉese, ĝis atingiĝas la limo de la kapablo de la 49 kosmaj dimensioj. Unue formiĝas la sep plej altaj mondoj. Ili estas la fundamento de ĉio en la kosmo. Ili estas la kosma fundamenta plano, la modelo de la ripetata sepdividiĝo de atomaj mondoj. La pli malaltaj sepserioj do estas kopioj malpliskaligitaj de la tuj pli altaj. Tiu malpliskaligado estas rezulto de la pliiĝo de la praatoma denseco kaj estas precipe perceptebla rilate la konsci- kaj movadaspektojn.

⁵Tiu sistemo de kopiado rezultigas, ke la sepserioj rilatas analogie al si reciproke kaj ke, tial, en pli malaltaj mondoj oni povas en multaj rilatoj konkludi almenaŭ interesajn analogiojn koncerne pli altajn mondojn.

⁶La principo de analogia kunmetiĝo sekvigas, ke la interrespondaj mondoj de la sepserioj prezentas kiel eble plej grandan konformecon koncerne ĉiujn tri aspektojn. La karakteriza de mondo 1 do reaperas en mondoj 8, 15, 22, 29, 36 kaj 43. La individua por mondo 7 retroviĝas (krom, kompreneble, ĉiuj neeviteblaj modifoj) en mondoj 14, 21, 28, 35, 42 kaj 49. La responda validas por la ceteraj mondoj de la serioj.

⁷La sepserioj da kosmaj mondoj formas tiom da kosmaj naturregnoj, diregnoj, kiom

ekzistas da serioj. La plej alta aŭ sepa regno konsistas el mondoj 1–7, la plej malalta aŭ unua el mondoj 43–49.

⁸Tiu individuo, kiu en lmondo 43 per sia propra laboro jam akiris konscion en mondo 42 (sekve fariĝinta 42-mio), estas nomata eniranto en la duan ”diregnon”.

⁹La kosmo estas finkonstruita de kolektivo de monadoj, kiuj jam akiris konscion en iu kosmo kaj mem tralaboris sian vojon supren tra ĉiuj ties 49 mondoj. Ili volas siavice vekti en konscion la praatomojn nekonsciajn en la pramaterio kaj ebligi al ili akiri ĉioscion kaj ĉiopovon en la kosmo.

¹⁰En nia kosmo ĉiuj 49 atommondoj de la sep kosmaj naturregnoj jam estas pleiĝintaj de individuoj, kiuj konsistigas kolektivon konscion vastiĝantan ĉiam pli en ĉiu pli alta mondo.

2.3 LA KONSCIASPEKTO DE LA EKZISTADO

¹En la sekvaĵo estos liveritaj kelkaj faktoj pri:

la kolektiva konscio
la sep fundamentaj tipoj de konscio
la sep departementoj de la planeda hierarĥio
la homaj tipoj de konscio
kelkaj problemoj de la esoterika psikologio
la telepatio

2.4 *La kolektiva konscio*

¹La scio plej esenca por kompreni la konsciaspekton de la ekzistado estas tio, ke ekzistas nur unu sola konscio en la kosmo, la kosma totala konscio, en kiu ĉiu monado havas neperdeblan parton. Ĉi tiu konscio estas kunfandiĝo de la konscio de ĉiuj monadoj en la kosmo.

²El tio sekvas, ke ĉia konscio estas laŭnature kaj individua kaj kolektiva. La kolektiva konscio estas la origina kaj komuna. La individuan mikonscion la individuo mem devas akiri tra ĉiam pli altaj naturregnoj, kio estas ebla ĝuste pro lia partopreno en la kolektiva konscio.

³Ĉiu materiagregaĵo en la kosmo, de atomo ĝis planeda mondo, sunsistemo aŭ kosma mondo, estas finfine kunmentita el praatomoj. Ĉiu agregaĵo havas kolektivon konscion.

⁴La sep atommondoj en la sunsistemo prezentas sep ĉefajn specojn de mondkonscio. La ses molekularaj mondoj interne de ĉiu atomspeco formas ses subgrupojn de kolektiva konscio interne de ĉiu ĉefa speco. La nombrado de ĉiuj specoj de kolektiva konscio estas praktike nefarebla. Ĉio, kio povas formi kolektivon konscion pro ia kunligiteco, aŭtomate formas tian.

⁵La monadoj konsistigantaj la agregaĵon povas troviĝi, kaj ordinare troviĝas, en malsamaj konsciniveletoj de treege malsama kapablo partopreni en la kolektiva konscio. La monadoj konsistigantaj la agregaĵon ofte apartenas al malsamaj naturregnoj, ofte longe antaŭiras la aliajn laŭ konscievoluado iu monado en la agregaĵo, kiu monado tiam per certa rajto povas rigardi la agregaĵon kiel sian kovrilon.

⁶La kosma totala konscio respondas al ”la animo de la mondo” de la antikvuloj aŭ ”dio imanenta”. Iuj diskutas pri la ”dissolviĝo de la animo en la monda animo”. Sed oni ne povas dissolviĝi en io, de kio oni jam estas parto. Kiam la mio estos atinginta la plej altan kosman mondon, ĝi estos tralaborinta pli ol 50 malsamajn, ĉiam pli altajn specojn de materiaj kovriloj havantaj la respondajn konscispecojn. ”Dio imanenta” signifas, ke ĉiu monado estas dio potenciala, dio fariĝanta (krome partoprenanta en kosma ”dieco”). ”Dio transcenda” estas ĉiuj pli altaj, superhomaj regnoj, kiuj kunlaboras por la evoluado. Koncerne al ”persona dio” la planeda hierarĥio forte deklaras, ke ĉiuj en pli altaj regnoj dankas por ke estu ŝparata al ili tia karikaturo. Estas la judismo enkondukinta la monoteismon en la religion, kaj antropomorfismo estis la neevitebla rezulto.

2.5 La sep fundamentaj tipoj

¹La enkonduko de la monadoj en la kosmon el la ĥaoso okazas pere de iu el la sep plej altaj kosmaj mondoj. Tio dekomence donas al ili certan stampon, tiel ke oni povas ilin dividi en sep tipojn.

²La tri unuaj tipoj de la sepserio estas la plej markitaj esprimoj de la tri aspektoj. La unua tipo estas la ekstrema fortotipo (la movadaspekto), la dua tipo reprezentas la konsciaspekton kaj la tria la materiaspekton. La kvar aliaj estas diferencigoj de la tri unuaj en materio pli kunmetita.

³La tipoj 1, 3, 5, 7 esprimas pliĝuste la objektivan flankon de la ekzistado, la tipoj 2, 4, 6 pliĝuste ĝian subjektivan flankon.

⁴Je ĉiu pli malalta kosma regno (sepserio da atommondoj) la tipoj subiĝas al tiuj modifoj, kiuj dependas de la materia kunmetiĝo. La tipoj sekve aperas malsamaj en malsamaj mondoj. Antaŭ ĉio estas granda la diferenco inter tipoj en la atomaj kaj en la molekularaj mondoj, kvankam restas io karakteriza de la originaj tipoj.

⁵Tial la demando estas, ĉu la plej taŭgan dividon de la kosmaj mondoj oni ne farus laŭ la principo de analogaj sepserioj, tiel ke oni nomus 11–17 la mondojn 1–7, 21–27 la mondojn 8–14, 31–37 la mondojn 15–21 kaj tiel plu, kaj oni nomus 71–77 la mondojn 43–49. Mondo kaj departemento tiam koincidus, tiel ke oni ĉiam scius pri la diferencaj mondoj, al kiu departemento ili apartenas.

⁶Plej ĝenerale povas esti dirite, ke la tipoj estas determinataj de la eblo de la tri aspektoj infludadi en diferencaj specoj de materio. Ĉiu atomspekto esprimas plej facile iun el la tri aspektoj. Tio sekvigas, ke ĉiu atomspekto ebligas precipan disvolvon de certaj specoj de kvalitoj kaj kapabloj.

⁷Vere la monadoj estas deorigine de iu certa tipo. Tamen dum la proceso de evoluado la individuo havos okazajn akiri en siaj kovriloj la kvalitojn de ĉiuj tipoj cele al la bezonata ĉiu-flankeco. Li ankaŭ havos okazon mem decidi, kiun tipon li fine preferas reprezenti. Antaŭ tio al li estas donita la eblo identigi en la kosmo sian konscion kun la diversaj specoj de kolektiva tipa konscio de la tiurilataj mondoj.

⁸La laŭtipa dividiĝo efikas ĝisfunde, en multaj manieroj kaj en sennombraj kombinoj. Eble ŝajnas strange, ke ĉiu sunsistemo, ĉiu planedo, ĉiu agregaĵo esprimas precipe iun el la sep tipoj. Ĉiu individuo apartenas al iu, ĉiuj kovriloj de la homo povas esti de malsamaj tipoj.

⁹Ankaŭ la individua karaktero influadas, tiel ke ĉiu individuo estas io unika, malgraŭ la tipo, kio kontribuas al pliĝanta kompreno kaj faras la kosman unuecon pli sonora.

2.6 La sep departementoj de la planeda hierarĥio

¹La sep plej malaltaj atomaj mondoj (43–49) konsistigas la plej malaltan aŭ unuan kosman regnon. Interne de nia sunsistemo ili apartenas al la sunsistema registaro, interne de nia planedo ili konsistigas la kolektivajn konscion de la planeda registaro.

²Nia planeda hierarĥio (ne registaro) dividiĝas en sep departementojn. En ĉiu departemento troviĝas kvar gradoj konsistantaj el 43-mioj, 44-mioj, 45-mioj kaj 46-mioj.

³Tiuj individuoj, kiuj plej malfrue transiris el la kvara naturregno en la kvinan, estas 46-mioj. Kune kun la 45-mioj ili formas la kvinan naturregnon. La du pli altaj specoj de mioj en la planedo (la 43-mioj kaj la 44-mioj) formas la sesan naturregnon, nomitan ankaŭ la plej malalta diregno.

⁴Estas la tasko de la planeda hierarĥio gardi super la evoluado en la kvar plej malaltaj naturregnoj.

⁵La sep departementoj en la planedo estas kopioj de la sep departementoj de la sunsistemo kaj, ĝis certa grado, kopioj ankaŭ de la sep tratute aperantaj tipoj en la kosmaj regnoj. Estas faritaj multaj provoj priskribi aŭ klarigi tiujn tipojn. Tiuj provoj estis, kompreneble, malsukcesaj kaj nur rezultigis idiotiĝon de la tuta afero.

⁶La plej taŭga nomado estus la matematika, do: la unua ĝis la sepa departemento.

⁷Rilate al la sep plej malaltaj atommondoj (43–49) oni povus prove kaj analogie nomi ilin:

1-a la manifestalulo, la dinamikulo

2-a la submanifestalulo, la ĉiounuiganto

3-a la superesencialulo, la ĉioscianto

4-a la esencialulo, la harmoniiganto

5-a la mensulo, la teknikisto

6-a la emociulo, la kuniganto

7-a la fizikulo, la organizanto

⁸Tiuj terminoj estas nuraj aludoj. Ĉiuj provoj de analogio kun homaj kvalitoj aŭ kapabloj estas tute abortaj, kaj tiaj rezultigis nur amason da superstiĉoj tipaj por la nesaniĝebla homa pretendemo, kiu kredas, ke ĝi povas juĝi ĉion.

⁹Koncerne la duan tipon oni diskutadis pri "dia amo". Tia (spite ĉion) tro homa koncepto ne povas ne esti erariga uzate pri tiu, kiu estas enirinta en la komunan konscion de la planedo kaj spertas sian nesepareblan unuecon kun ĉio.

¹⁰La unua departemento reprezentas la movadaspekton (la volon, la energiojn), la dua la konsciaspekton kaj la tria la materiaspekton. La kvar ceteraj estas laŭcele taŭgaj modifoj de la tri.

¹¹En la "neparaj" departementoj 1, 3, 5, 7 kaj en la "neparaj" mondoj 43, 45, 47, 49 la konscio estas pli objektiva kaj ekstravertita; en la "paraj" departementoj 2, 4, 6 kaj en la "paraj" mondoj 44, 46, 48 ĝi estas pli subjektiva kaj introvertita.

¹²La departementaj energioj plej bone efikantaj en la homaj kovrilaj konscioj estas

1, 4, 5 en la mensa konscio,

2, 6 en la emocia konscio,

3, 7 en la fizika konscio.

2.7 La homaj tipoj de konscio

¹La sep planedaj tipoj ekzistas nur en la mondoj de la planeda hierarĥio (43–46).

²La puraj homaj tipoj ne ekzistas en la homa regno en ĝia nuna evolustadio. Ili aperos nur en la plej lasta aŭ sepa radikraso.

³Ĉiuokaze estas tikla afero klarigi ankaŭ tiujn tipojn. Provoj servas nur por liveri novan materialon por eksceso al la homa fantazio, kiu ĉion sensencigas. Oni nomis la purajn tipojn ĉefaj kaj la efektive ekzistantajn subtipoj.

⁴La kvin kovriloj de la homo povas aparteni al kvin malsamaj departementoj. La enkarniĝaj kovriloj ordinare ŝanĝas departementojn en ĉiu nova vivo, tiel ke la individuo senĉese ŝanĝas "la tipon". Li povas posedi ion el ĉiuj kvin tipoj.

⁵La viro ŝajnas virineca se li ĵus finis longan serion da virinaj enkarniĝoj, la virino ŝajnas vireca post longa serio da viraj enkarniĝoj.

⁶Ĉe la viro la organismo kaj la emocia kovrilo estas pozitivaj, dum la etera kaj mensa kovriloj estas negativaj; ĉe la virino la malo validas: la organismo kaj la emocia kovrilo estas negativaj, la etera kaj mensa kovriloj pozitivaj. Tio klarigas, kial la virino pli facile eltenas doloron kaj estas mense pli sekura, kial la viro estas emocie agresema kaj tiel plu.

⁷Nur 46-mioj scipovas konstati al kiuj departementoj apartenas la kvin kovriloj. Spekulativado pri la tipapartenado de iu individuo sekve estas sensenca.

⁸Tamen por fari aludon pri la sep homaj tipoj, estu farita la jena provo, ĉe atentigo de la rezervoj jam indikitaj, montri po io karakteriza pri la sep tipoj.

⁹La unuan tipon karakterizas forta tiel nomita volo, kiu faras la individuon taŭgan kiel gvidanton, realan kaj publike agnoskitan. Tiu tipo ofte "iras kun propraj ondoj tra la maro" sen konsidero al la sekvoj kaj opinioj de aliaj.

¹⁰La dua tipo estas la saĝeca tipo, posedanta scion, sperton kaj komprenon. Li estas la denaska instruisto, volas kaj kapablas unuigi ideojn kaj homojn, kaj tiel plu, reciproke kontraŭajn.

¹¹La tria tipo estas la pensanto, filozofo, matematikisto (ofte la nepraktika teoriulo), ĉion ekzamenanta de ĉiuj flankoj kaj tiel plu.

¹²La kvara tipo estas la desegnisto, arkitekto, urboplanisto, artista konstruisto kaj tiel plu, celanta harmonion en ĉio kaj posedanta fortan senton pri formo kaj koloro.

¹³La kvina tipo estas la sciencisto, esploristo kun sento pri detaloj, malkovranto, elpensanto kaj tiel plu. Estas interese, ke ankaŭ tiuj, kiuj iras la 6–4–2-vojon, devas havi dum serio da enkarniĝoj la 5-an departementon en sia pli malalta kaŭzala kovrilo (la parto enkarniĝanta).

¹⁴La sesa tipo estas la ĉefe emocia, fantaziema homo en religio, beletro kaj tiel plu, havanta trajtojn de fanatikeco kaj fortajn simpatiojn kaj malsimpatiojn.

¹⁵La sepa tipo estas la ordema homo kun forta sento pri ĉio rilatanta al proceduro, ceremonio, ritualo kaj tiel plu. Restas esotera la simbola signifo de la "ritualo" kiel apogo de la diversaj momentoj en la proceso de formigo de la materio.

¹⁶La homaj tipoj estas pliĝuste ekzemploj de reagmanieroj kiel rezultoj de konstanta influado de certaj specoj de fiksjaj energioj (vibradoj).

¹⁷La grado, ĝis kiu la tipoj esprimiĝas, dependas grandaparte de, interalie, la evolunivelo atingita, la procentoj da kvalitoj kaj kapabloj akiritaj jam antaŭe, latentaj sed pli-malpli facile revekeblaj.

¹⁸Unuformeco malestas. Ĉio en la ekzistado estas individua kaj unika kaj, post la akiro de la konscio de unueco, estas ĉiam bonvena kontribuo por pliigi la sonorecon de la kosma harmonio.

2.8 Kelkaj problemoj por la psikologio de la estonteco

¹La konscio estas kosma oceano. La homa psikologio havas la eblon esplori la tri plej malaltajn el ĝia 49 diferencaj tavoloj. La ceteraj apartenas al la superkonscio de la homo. Havante tiun minimuman partoprenon en la konsciaspekto de la ekzistado, la homo, kompreneble, malhavas la antaŭkondiĉojn por juĝi la veran naturon de la konscio.

²La saman oni povas diri pri la ŝanco de la homo konstrui pensosistemon akordantan kun la realo, sistemon ebligantan klarigi la tri aspektojn de la ekzistado, la sencon kaj celon de la ekzistado, la kaŭzojn de la okazado en la naturo kaj tiel plu.

³Ni ricevas donace ĉiujn tiujn faktojn, kiujn ni bezonas por la necesa orientiĝo en la mondo kaj en la vivo. Sed estas nia afero meti tiujn faktojn en siajn ĝustajn kuntekstojn.

⁴En psikologia rilato estas atendendaj pli kaj pli da faktoj pri:

la homaj tipoj de konscio

la homaj evolustadioj

la konscio en la diversaj molekulspecoj

la konscio en la kvin homaj kovriloj de malsamaj materioj

kiel ni akiru kapablon de aktiveco en la diversaj centroj de la kovriloj

kiel ni akiru ĉiam pli altajn specojn de sensado (objektiva konscio en niaj pli altaj kovriloj).

⁵La psikologoj devus provi klarigi, de kio dependas tio, ke "bonaj decidoj" efikas tute kontraŭe; montri, ke la diversaj specoj de homa konscio havas siajn sidejojn en diversaj materiaj kovriloj, ke ofte regas streĉo inter tiuj kovriloj, ke la subkonscio en batalo kontraŭ la maldorma konscio venkas preskaŭ ĉiam.

⁶Estas grava por esplorantoj de ĉiuj specoj la kompreno, ke ĉio estas unika. Ĉiu praatomo (monado) estas unikaĵo. Ĉiu ajn kuniĝo de monadoj estas unikaĵo. Ĉiu ŝanĝiĝo estas unika (depende de la senĉesa interŝanĝo de atomoj en la agregaĵo).

⁷La komuna en ĉio estas, koncerne la materiaspekton, la konstantaj rilatoj (la leĝoj) kaj, koncerne la konsciaspekton, la kolektiva konscio vastiĝanta ĉiam pli.

2.9 Telepatio

¹Niaj grandegaj, science edukitaj psikologoj neas kaj ridindigas, kompreneble, ĉiujn tiajn aferojn, kiel telepation. Tio nome superas ilian kapablon de konstatao.

²El la kvin kovriloj de la homo – la organismo (cerbo kaj nerva sistemo), la fizik-etera, emocia, mensa kaj kaŭzala kovriloj – kvar (ne la organismo) servas kiel vivaj riceviloj. Ili nome konsistas el elementala materio kun pasiva konscio. Mankas al ili la eblo de propra aktiveco sed ili estas nesupereble sensivaj al ĉiaspecaj vibradoj kaj estas perfektaj robotoj.

³Kiom da tiuj vibradoj povas percepti la homo, dependas de lia evolunivelo. Kiom li efektive perceptas de tio, kion li eble povus, dependas de lia kapablo atenti kaj kapablo samtempe atenti en ĉiuj kvar kovriloj.

⁴Ĉiuj vibradoj, kiuj superas lian nivelon, preskaŭ ĉiam preteriras senspure. Ili apartenas al lia superkonsciato, kaj pri ĝi li eĉ ne scietas.

⁵Oni povas dividi la emociajn kaj mensajn konsciesprimojn de la homo en du grupojn: propra aktiveco kaj robota aktiveco (inkluzive de "kutimpensado": aŭtomatigitaj, origine propraj, emociaj kaj pensaj asocioj).

⁶Ĉe la plejmulto da homoj pli ol 80 procentoj da ilia konsciaktiveco estas emocia kaj mensa robotaktiveco.

⁷La vibradoj ricevataj de la robotoj estas plejparte vibradoj reproduktitaj de tio, kion aliaj jam sentis kaj pensis, kion la homo perceptas kaj redissendas, plifortigitan per sia atento, en la emocia kaj mensa mondoj.

⁸Kion la individuo kaptas, tio estas, ordinare kaj plej ĝenerale, kio tuŝas liajn sciregionojn kaj interesojn, kio antaŭ nelonge li aŭdis aŭ legis kaj tiel plu. La alia preteriras senspure.

⁹La homa pensado estas plejparte amaspensado: grupa, klana, klasa, nacia pensado, kion la homo nescie partoprenas kredante, ke li pensas "memstare", ne konsciante, de kie ĉio venas.

¹⁰Lichtenberg videtis ĉi tiun ideon, skribante (en la 18-a jarcento): "Oni devus ne diri, mi pensas, sed anstataŭe, pensas en mi." Estas karakterize, ke oni ne komprenis la ĝustecon de tio eĉ post du cent jaroj.

¹¹La sciencistoj jam plenumis grandegan laboron. Tion ni volonte agnosku. Des pli bedaŭrinda do estas ilia ankoraŭ dogmema sintenado, kiu malfaciligas kaj malhelpas la esploradon ĝis rekte nekredbla grado. Ĉu vere ili kredas, ke ili jam ĉion esploris, ke revoluciaj malkovroj restas neniaj? Tiam la esoterikisto povas diri al ili, ke tiaj atendos ilin ankoraŭ dum multaj jarmiloj. Same kiel la sciencistoj ridas pro la homoj de antaŭ cent jaroj, tiel cent jarojn post nun ili miros pro la nuna manko de kompreno de la esoterikaj faktoj, limtuŝanta naivecon. Sed tiel granda estas la rezistado, tiel estas la homaro misgvidata de sennombraj idologioj en teologio, filozofio kaj scienco, ke pli ol miliono da esoterikistoj nun vivantaj (inter ili elstaraj sciencistoj) estas devigataj teni ĉe si sian scion.

¹²La telepation oni plej facile klarigas per la fakto, ke ĉia konscio estas kolektiva kaj komuna al ĉiuj laŭ la grado de ilia kapablo akirita de perceptado. Ni ĉiuj partoprenas en la kolektiva konscio.

LA MOVADASPEKTO DE LA EKZISTADO

¹En la sekvaĵo estos liveritaj kelkaj faktoj pri:
la proceso de manifestiĝo
la sep fundamentaj energioj
la sunsistemaj kaj planetaj energioj
"la mondon regas ideoj"

2.11 La proceso de manifestiĝo

¹En *La filozofa ŝtono* de Laurency estas pritraktita pli detale la granda kosma proceso de manifestiĝo, per kiu ekestas la kosmo kun ĝia tuta enhavo.

²La grandajn ĉefajn procesojn oni povas dividi jene:

la procesoj de involvado kaj evolvido

la procesoj de involuado kaj evoluado

la proceso de ekspansiado

³En la proceso de involvado la nekonsciaj praatomoj (monadoj) estas enigitaĵoj el la ĥaoso kaj estas involvitaĵoj, fariĝontaj ĉiam pli kunmetita materio, kosmaj materiaj mondoj kaj sunsistemoj kaj planedoj.

⁴En la procesoj de involuado kaj evoluado la nekonsciaj monadoj vekigaĵoj en konscion, post kiam ilia konscievoluado pluiĝas en ĉiam pli altaj naturregnoj.

⁵En la proceso de ekspansiado la individua konscio plivastiĝas en kolektivajn konscion ampleksantan pli kaj pli, ĝis la celo por ĉiuj monadoj estos atingita: la komuna kosma totala konscio.

⁶La sep mondoj plej altaj en la kosmo (1–7) estas la bazo de ĉio en la kosmo. Ili konsistas el monadoj, kiuj trapasis en alia kosmo la proceson de manifestiĝo, lernis utiligi dinamison (la eterne blindan ĉiopovon de la pramaterio, la fonton de ĉia forto) kaj siavice nun elkonstruas la kosmon kaj direktas la proceson de manifestiĝo.

⁷El tiuj sep mondoj originas ĉiuj tiuj materiaj energioj, kiuj formas la materion kaj la mondojn, farante la kosmon viva tutaĵo statanta en senĉesa ŝanĝiĝo.

⁸Kiel bazo de la tuta proceso de manifestiĝo ekzistas plano skizita en ĝeneralaj trajtoj, en kiu la fincelo (la ĉioscieto de ĉiuj partoprenantaj monadoj) estas la sola determinita ero. En sia irado la proceso estas pli malpli dependa de la kunagado de ĉiuj monadoj. Vere ili ne povas malhelpi al la plenumado de la proceso, sed ili povas per inerto aŭ rezistado ĝin malakceli.

⁹Ĉiu okazado, ĉiuj procesoj de la naturo, la formiĝo, ŝanĝiĝo kaj dissolviĝo de la materio originas finfine en la sep plej altaj kosmaj mondoj. Ili sekve estas la bazo de la movadaspekto de la ekzistado.

¹⁰Tiuj originaj energioj periĝas al la sunsistemoj per la kvin interaj kosmaj ekspansiaj regnoj (la kvin sepserioj de la mondo 8 ĝis la mondo 42), ĉe kio la tuj pli alta transformas kaj malpliskaligas la materiajn energiojn por plua transigo al la tuj pli malalta.

¹¹Koncerne la tri aspektojn de la ekzistado el la ĝis nun dirita estas evidenta la jena:

¹²La reciproka relativa signifo de la tri aspektoj subiĝas al kontinua ŝanĝo en la proceso de manifestiĝo. En la pli malaltaj naturregnoj la materiaspekto ŝajnas esti la sola. En ĉiu pli alta regno la konsciaspekto iĝas pli kaj pli grava, tiel grava ke la materiaspekto (kiu ja restas la neperdebla substrato) ŝajnas al la konscio plene sensignifa. Tamen ĉar la blinda ĉiopovo de dinamiso manifestiĝas ĉiam pli klare en ĉiu pli alta speco de atoma konscio, tial la movadaspekto (ankaŭ nomata la volaspekto) fine iĝas la ĉiosuperrega.

¹³Dinamiso efikas sen limiĝo en la ĥaoso kaj kiel blinda forto povas kaŭzi nur ĥaoston. Direktate de la ĉioscieto kaj ĉiosaĝo, ĝi kaŭzas la plenan laŭcelecon, estante surbaze de la scio pri la konstantaj rilatoj de la materiaspekto. Ĝi faras la universon "perpetuum mobile" kaj kaŭzas pli altan materion efiki kiel energio sur pli malaltan materion.

2.12 La sep fundamentaj energioj

¹Kiel estas jam dirite, tiuj materiaj energioj, kiuj elfluadas el la sep plej altaj kosmaj mondoj, estas la fonto de ĉiuj energioj en la kosmo. Vere la praforto estas dinamiso, sed la origina materia materialo de la energioj estas praatomoj. Ĉiuj energioj estas materiaj.

²La sep fundamentaj energioj estas diferencaj esprimoj de tiu individueco, kiu kaŭzas, ke ili, laŭ la leĝo de la malplej granda rezisto, obeas la numeran principon de la sepserio

(ekzemple la sepa energio tra la mondoj 7, 14, 21 kaj tiel plu).

³La sep fundamentaj energioj kunmetiĝas ĉiam pli kaj malpliskaliĝas en ĉiu pli malalta kosma regno, ĝis ili atingas la plej malaltan regnon (43–49), la sferojn de la sunsistemoj, kaj estas tie utiligataj de la sunsistemaj registaroj.

⁴La kosmaj energioj senĉese aktivatas. Tamen en la sunsistemoj ilia aktiveco pliiĝas kaj malpliiĝas laŭ periodeco neevitebla por la tiurilataj procesoj de materio (la tiel nomita leĝo de periodeco). La ritmo de tiu periodeco aliĝas en ĉiu mondo, ĉiu speco de materio, ĉiu speco de materiaj kovriloj.

⁵Estas tiu leĝo de periodeco, kiu kaŭzas, ke ĉio en la sunsistemoj kaj en la reciprokaj rilatoj de la sistemoj okazas en tempoperiodoj aŭ cikloj matematike difineblaj kaj laŭregule revenantaj.

⁶La ekvilibro de la vivo, la ekvilibro laŭ materia kunmetiĝo kaj materiaj energioj postulas senĉesan interŝanĝon de la diversaj vivosubtenantaj energioj.

⁷Tiamaniere ekzemple la tiel nomata vivoforto de la organismo dependas de tio, ke kvin malsamspecaj energioj anstataŭas unu la alian kun intervaloj de 24 minutoj, sekve periode revenante ĉiun duan horon.

⁸La plej ampleksaj el tiuj cikloj, la sunsistemaj cikloj, nomiĝas eonoj (4320 milionoj da jaroj).

⁹En ĉia okazado regas cikla aktiveco. Kiam iufoje publikiĝos la evoluhistorio de la homaro, tiam ankaŭ la efektivaj historiaj epokoj eniros en la scion de la publiko, kiu tiam spertos surprizon: La astronomoj povos per la helpo de la ĉielmeĥaniko ekzakte kalkuli la difineblajn tempopunktojn de la okazado pasinta.

2.13 *La sunsistemaj kaj planedaj energioj*

¹La kosmaj energioj, kiuj atingas la sunsistemojn, venas voje de la sep mondoj de la kosma regno antaŭ la plej malalta (36–42).

²La sunsistemoj formas vaste disbranĉiĝintan reton por la distribuado de tiuj energioj.

³Ĉiu sunsistemo trapasas tri diferencajn stadiojn de disvolviĝo respondajn al la tri aspektoj: la aspektoj de materio, konscio kaj movado. En ĉiuj tiuj tri kazoj la sunsistemo subiĝas al kompleta refando.

⁴Sendepende de tio la planedoj en la sunsistemo trapasas sep diversajn procesojn de disvolviĝo, dividitajn en sep periodojn de aktiveco kaj pasiveco, nomitajn eonoj (sanskrite: kalpoj po manvantaro kaj pralajo).

⁵La sunsistemoj de pli alta grado peras la kosmajn energiojn al tiuj de pli malalta grado. Nia sistemo estas de la dua grado. La energioj venantaj de aliaj sunsistemoj atingas la planedojn pere de la suno, kies tasko estas interalie la transformado de la atomaj energioj en molekularajn. Tiujn sep ĉefajn specojn de molekularaj energioj oni povas, iel ĉiujn sepopojn, dividi en tri pli altajn kaj kvar pli malaltajn. La tri cirkulas interplanede. La kvar distribuiĝas al la planedoj, ankaŭ ĉe kio la cirkulada principo aplikiĝas, tiel ke la planedoj ricevas energiojn unu de la aliaj.

⁶Sunsistemoj kaj planedoj ĉiam reprezentas precipe iun el la sep kosmaj tipoj, ĉiam en sia individue karakteriza maniero, ĉar ĉio en la kosmo estas samtempe tipiĝinta kaj individue karakteriza.

⁷Tiu tipiĝado kun samtempe pluiranta diferenciĝado malsupren ĝis la individua karaktero kaŭzas, ke prezentiĝas en ĉiam pli malaltaj regnoj kontinua sudividiĝo de la tipoj, ĝis ĉiu individuo fariĝas io individue karakteriza, sed samtempe, ke li estas io da ĉiuj tipoj, oni tamen povas diri, ke en iu aspekta rilato li reprezentas iun ĉeftipon.

⁸La energioj ĉiam estas tipaj energioj kun la implicita en ĉi tio efiko sur la diversajn tipojn en la diversaj specoj de materio kaj de konscio. Kiam certa tipaktiveco superregas, tio metas sian stampon sur la individuojn kaj kolektivojn en iliaj individuaj karakteroj. Tio sekvigas

siavice, ke ĉiu proceso estas io individue karakteriza kaj povas neniam plu formi ion precize saman, neniam plu estigi la precize saman rezulton. (Por deflankiĝi en la historion: jen la klarigo de tio, ke ni tiel malfacile prenas instruojn de la historio, ĉar la tipa perdiĝas en la individua.) Heraklito provis aludi la eternan individuecon de ĉio, dirante, ke ni ne povas dufoje malsupreniri en la precize saman riveron. Per tio frakasiĝas la Niĉeaj fantazioj pri la "eterna reiro" al la precize sama. Tio estas neebla, ĉar ĉio estas unika.

⁹Oni devas aldoni, ke ĉiuj atomoj de ĉiuj materiaj agregaĵoj energiojn ricevas kaj siavice elsendas.

¹⁰La energioj venantaj de ekstere havas siajn tipon kaj individuan karakteron. La energioj plue perataj ĉiam subiĝas al certa kolorado de sia individua karaktero ĉe tiuj novaj agregaĵoj, kiujn ili trafluas.

¹¹La scio pri la rilatoj de niaj sunsistemo kaj planedo al aliaj sunsistemoj, pri la interŝanĝo de energioj interstelaj kaj interplanedaj, iam estis el la plej gravaj de la sciencoj de la homaro. La nacio plej progresinta en tiuj scioj estis la kaldea de antaŭ ĉirkaŭ 30 mil jaroj. Ĝojige estas, ke ni povas atendi, ke la individuoj akirintaj en Kaldeo tian scion ree enkarniĝos por denove donaci al la homaro la esoteran "astrologion", per tio revekante la scion delonge forgesitan. La necesajn faktojn ili ricevos de la planeda hierarĥio, kaj per tio vekiĝos en novan vivon ilia scio latentata. Tia senĉese okazas, kaj ankaŭ laŭ la Leĝo ĝi okazas. Kion la homaro povas fari, tion ĝi devas fari mem. Rememorado de scio perdita estas afero de la homaro.

¹²Kaj per tio ni ekdiskutis la astrologion, rigardatan de la astronomoj kiel plej krudan superstiĉon. Laŭ historia vidpunkto oni povas paroli pri kvar specoj de astrologio: la esotera delonge forgesita, tiu alprenita de la antikveco kaj multrilate koruptita (la Ptolemea kun la deirpunkto en nia planedo kvazaŭ la centro de la universo), la degenerinta de la mezepoko kaj, en nia tempo, la empiria astrologio, kiu ekzamenas statistike horoskopojn sisteme kolektitajn, irante la vojon de indukta esplorado. Sub horoskopo oni komprenas la resumon de konstateblaj ĉielaj rilatoj al ekzakte donitaj tempopunkto, longitudo kaj latitudo de nia planedo ĉe la "naskiĝo" de iu aĉeraĵo. La koncerna monado (aŭ grupo da monadoj) per tio reeniras en iun kaŭzan rilaton, rompiĝintan dum certa tempo. "La leĝo povas atendi." Per la horoskopo oni akiras scion pri kiaj esencaj energioj plej forte influas ekzemple personon dum la vivo. Se aldone oni konas la diversajn kovrilojn de la individuo kaj kapablas konstati, kiaj vibradoj plej forte influos ilin, tiam oni povas el tio tiri multajn gravajn konkludojn pri tiuj karakterizaj problemoj, kontraŭ kiuj devas lukti la individuo. Tamen tio ne signifas, ke oni povas antaŭdiri la sortojn de la individuo. Tio tute eliminus la leĝon de libereco. Nenio estas antaŭdeterminita detale. La nova astrologio esoterika definitive metos finon al la fatalismo kaj la antaŭdestinismo.

¹³La ekzotera astrologio ne estas ekzakta. Ĝi ankoraŭ ne scias pri multaj necesaj faktoj. Eĉ gvidate de siaj dek du zodiakaj tipoj kaj sep planedaj tipoj, ĝi ne scipovas ekzakte difini iliajn rilatojn al la tipoj ekzistantaj. Ĝi ne povas interpreti ĉiujn eblojn de la horoskopo. Ĝi nenion pli scias ol pri la horoskopo de unu el la kvin kovriloj de la individuo.

¹⁴La sorto de la astrologio estas unu el multaj ekzemploj pri tio, kiel okazas, kiam esotera scio falas en la manojn de neinicitoj. La saman oni povas diri pri la hilozoiko en la filozofio kaj la gnostiko (la sekreta doktrino de Ĥristos) en kristanismo. La rezulto estas superstiĉo de pli-malpli kruda speco.

2.14 "LA MONDON REGAS IDEOJ"

¹Kio devas esti evidenta el la sekvaĵo:

"La mondon regas ideoj"

Kosmaj ideoj

Hierarĥiaj ideoj

La ideoj en la homaro

2.15 "La mondon regas ideoj"

¹Per tiuj vortoj "dia Platono" elperfidis sekreton, malkaŝante aksiomon esoterikan. Li tion kuraĝis, kompreninte, ke neniu povos kapti la sencon de la aksiomo. Kaj li praviĝis.

²Kompreni la aksiomon povas nur esoterikisto. Tio devus esti evidenta el la sekvajo. Neniu ekzoterulo komprenis eĉ tion, kion volis diri Platono per ideo aŭ idemondo. Tamen nekred-eblan multon da galimatio sagaca kaj profunda oni elspezis por tio, kio estas iel ajn bona pruvo de la nekurablebla malmodesto de la nescio kaj fido je sia juĝkapablo: je sia kapablo juĝi sen scio pri la faktoj de la realo. La sana prudento estas la rekta perceptado, fare de la kolektiva konscio de la homaro, de la realo en ĉiu mondo aparte. Mankas al ni la logika rajto deklari ion ajn pri nekonataj mondoj. Ni ne povas ĝuste kompreni ilian realecon. Ili ĉiuj estas tute malsamaj laŭ sia formiĝo de la tri aspektoj, spite de analogioj ekzistantaj.

³Kiel esprimo de konscio la ideo apartenas al la konsciaspekto. Ĝia realiĝo tamen apartenas al la movadaspekto. Kio estus ĉioscio sen ĉiopovo?

⁴"La mondon regas ideoj", ĉar la tuta proceso de manifestiĝo iradas laŭ kosmaj ideoj.

2.16 Kosmaj ideoj

¹La tuta proceso de manifestiĝo estas kontinua proceso de ideoj.

²Ekzistas ideoj kosmaj, sunsistemaj, planedaj: tiom da diversaj specoj de ideoj, kiom da specoj de atoma konscio kaj de atomaj mondoj en la kosmo.

³La registaro de nia planedo administradas la kosmajn ideojn pri la daŭrado kaj disvolv-iĝado de la vivo en la planedo kaj ankaŭ kontroladas, ke ili laŭleĝe efektivigas.

⁴Estas tiuj ideoj, kiuj kaŭzas la okazadon en la naturo, la formiĝon, ŝanĝiĝon kaj disvolv-iĝon de la materio, kio estas la antaŭkondiĉo de la konscievoluo de ĉiuj naturreĝoj.

⁵Ne estas tiel, kiel opinias la fizikismuloj, ke la laŭceleco en la naturo estas speciala kazo de meĥanike efikantaj fortoj de nekonscia materio. Validas la ekzakte mala kazo: la meĥanike efikantaj energioj interne de la sunsistemoj estas speciala kazo de la laŭcelaj: aŭtomatiĝintaj konscirobotaj, kiuj plenumadas kun senerara precizeco la konvenajn al ili taskojn.

⁶Nek al la registaro nek al la hierarĥio planedaj plaĉas iaspeca kulto de personoj. Ili klar-igas, ke la plej evoluinta monado en iu pli konstanta kolektiva konscio (ekzemple la planeda reganto) forlasas sian oficon por pli altaj taskoj, kiam iu estas tiom evoluinta, ke tiu povas transpreni la funkcion.

⁷Devas ekzisti superreganto (unu eonon antaŭanta la tuj sekvajn rilate konscievoluadon, konsciekspansion), ĉar finaj decidoj devas esti unusencaj, sen eblo de diverĝo.

2.17 Hierarĥiaj ideoj

¹Tiuj kosmaj ideoj koncerne la konscievoluon, kiuj estas efektivigotaj en la homa kaj pli malaltaj regnoj, estas difinitaj de la planeda registaro kaj plenumitaj de la planeda hierarĥio. Idealojn oni povas akcepti aŭ malakcepti. Sed hierarĥiaj ideoj estas efektivigendaj, kiel ajn longan tempon tio postulos.

²Same kiel la homaro havas sian plej altan mondon (la kaŭzalan) kaj povas de tie ĉerpi ideojn, tiel la planeda hierarĥio havas idemondon sian, la plej malaltan mondon de la planeda registaro.

³La laboron de la planeda hierarĥio oni povas legi en la historio de la planedo pri la konscievoluo, okazanta en la fizika mondo, de la kvar pli malaltaj naturreĝoj. Tiu historio estas en sia pleno konservita en la kolektiva memoraro de la submanifestala mondo. Akaŝo, pri kiu tiel multe paroladis Rudolf Steiner, estas, ne la astrala mondo (48), kiel kredis Steiner, sed la submanifestala mondo (44).

⁴La historio de la homa individuo troviĝas en la kolektiva memoraro de la kaŭzala mondo (47).

⁵La kaŭzala mondo, la Platona idemondo, estas la propraĵo de la planeda hierarĥio. Ĝi estas

alirebla por tiuj, kiuj akiris kaŭzalan konscion. La kaŭzalaj ideoj reproduktas la realon tia, kia ĝi estas reprezentebla en tiu speco de konscio. La ideprovizon de la kaŭzala mondo nomis Patanĝali, la hinda forminto de la raĝajoga sistemo, la pluvnubo de aferoj scieblaj”.

⁶Kion bezonas la homaro por sia konscievoluado, ĉion tion ĝi ricevas senpage. Ĝi ricevas okazajn konatiĝojn, en sennombraj enkarniĝoj, kun la realo per spertoj propraj. Ĝi ricevas la instruon pri ĉiuj tiuj faktoj, kiujn ĝi bezonas por sia orientiĝado enreala kaj enviva, kaj kiujn ĝi ne mem povas konstati. Ĝi ricevas ĉiujn eblojn. Sed kion ĝi povas fari mem, tion ĝi devas fari mem, solvi ĉiujn siajn proprajn problemojn mem. La leĝo de memrealigado estas kosma leĝo, valida en ĉiuj regnoj.

2.18 *La ideoj en la homaro*

¹La fizikismuloj kredas, ke ideoj estas subjektivaj konceptoj de la homa cerbo. Tio ja ĝenerale estas ĝusta koncerne la enhavon laŭrealan de iliaj ideoj, ĉar tiuj konsistas el emociaj iluzioj kaj mensaj fikcioj.

²Emociaj iluzioj estas mensaj konceptoj, kiuj estas emociigitaj, fariĝintaj neŝanĝeblaj konvinkiĝoj (dogmoj, kredoj) pro emociaj bezonoj. Ekzemplojn de tiaj prezentas ĉiuj politikaj idiologioj kaj religiaj dogmoj.

³Al mensaj fikcioj apartenas ĉiuj kapricideoj, griloj, konjektoj, supozoj, akceptoj kaj tiel plu inkluzive la hipotezojn kaj teoriojn de la scienco; ĉiuj estas mensaj konstruaĵoj sen ĉiuj faktoj enmetitaj en siajn ĝustajn kuntekstojn.

⁴Scio kontraŭe estas perfekta idesistemo farita el la necesaj faktoj. Ĉu ĉiuj faktoj ĉeestas, povas determini nur la planeda hierarĥio.

⁵La homaro devas iri ankoraŭ longan vojon, ĝis fine ĝi lernos diferencigi inter tio, kion ĝi scias kaj tio, kion ne. Sokrato estis unu el la malmultaj homoj, kiuj sin tenas je la sekura flanko. Aliaj sin trompas per sia sagaceco kaj profundeco.

⁶Karakterize estas, ke ĝenerale tiaj inteligenteguloj ne estas incitaj en esoterajn sciordenojn kaj ke, okaze de prospero, ili restas en gradoj malaltaj. En ne pli bona stato estas ankaŭ tiuj, kiuj fabelas pri sia intuicio aŭ fidas sian kapablon juĝi la realecon de siaj ”revelacioj” aŭ klarvidaj spertoj.

⁷Se oni ne scias, intelektas, vidas kaj komprenas, tiam sufiĉa porcio da sana skeptikeco estas la sinteno plej sekura, laŭ konsilo de 45-mio D.K., por kontraŭi al la kredemo kaj blinda fidado je aŭtoritatuloj.

⁸La ideojn oni povas dividi en du ĉefajn klasojn:

la ideoj hierarĥiaj

la ideoj de la kaŭzala mondo

⁹La hierarĥiaj ideoj ampleksas tiujn faktojn, kiujn bezonas la homaro por racie koncepti pri la realo kaj la vivo, pri la senco kaj celo de la ekzistado, pri ĉio tio, kion ĝi ne mem povas konstati. Tiuj faktoj estas liverataj iom post iom laŭmezure, kiel la homaro tiom evoluas, ke ĝi povas ilin ĝuste intelekti, enmeti ilin en ĝustajn kuntekstojn kaj ne misuzi ilin malutile al la vivo kaj ruiniĝe al si mem.

¹⁰Por ke tiujn ideojn oni povu kapti, estas necese, ke ili malpliskaliĝu al la mensa konscio pli malalta. Tiuj homoj, kiuj okupiĝas pri la tiurilataj problemoj kaj estas agorditaj al la ”ĝusta ondolongo”, povas kapti la respondajn mensajn molekulojn. Post tio sekvas materio- kaj konscioproceso, kiu povas okupi relative longan tempon, en multaj kazoj eĉ ĝis dek kvin jaroj. La mensa ideo fariĝas parto de la konscio – ofte superkonscio – de la mensa kovrilo, ofte kiel ”antaŭscieto”, fariĝas iom post iom mensa koncepto kaj poste tralaborante malaltiĝas al la mensaj molekuloj en la cerbaj ĉeloj. Nun ĝi povas esti formita en difinon.

¹¹”La mondon regas ideoj” signifas, kiom la homaron koncernas, ke la ideoj estas la mejloŝtonoj de la evoluado, ke tio, kion ni nomas la historia okazado, iradas laŭ kosmaj ideoj malpliskaligitaj fare de la planeda hierarĥio. La homaro progresas laŭmezure, kiel tiuj ideoj povas

esti konceptataj kiel idealoj kaj siatempe esti efektivitaj. Ke tiuj idealoj estas rigardataj kiel utopioj, atestas la evolustadion de la homaro.

¹²Ankaŭ aliajn rimedojn oni uzas kompreneble. Tiamaniere, ekzemple, al klanoj en la kultura stadio estas permesate enkarniĝi, kiam nova kulturo estas konstruota, kaj al klanoj en la barbara stadio enkarniĝi, kiam la malnovaj, fine nevivipovaj aŭ vivomalamikaj kulturoj estas frakasotaj. La sama proceso ripetiĝas ĉiun zodiak-epokon (po ĉirkaŭ 2500 jaroj).

¹³Ekzemplojn de idealoj fuŝitaj prezentas kaj aŭtokrateco kaj demokratio kaj komunismo. Ĝis nun ilin oni ĉiam sensencigis kaj krueligis. Ili estas diversaj aspektoj de unusama ideo kaj devas dum la irado de la historio efektiviĝi en sintezo pli aŭ malpli frue.

¹⁴Ankaŭ ”la penson sekvas energio” estas esoterika aksiomo, kiun la psikologoj ankoraŭ ne povas intelekti.

La supra teksto estas la dua parto el tute sep de *La scio pri la realo*, libro verkita de Henry T. Laurency. Tradukis el la sveda Lars Adelskog en 1980. Kopirajto © Eldona fondaĵo Henry T. Laurency 1980 kaj 2017. Titolo de la sveda originalo: *Kunskapen om verkligheten*.